2-a jaro - N° 2 Januaro 1943

(3-a daŭrigo)

# „PACO KAJ JUSTECO"

EL LA HISTORIO DE NIA URBO BRUGGE

MEDEDEELINGEN VOOR DE LEDEN

La hospitalo de St.Johano jam dulonge ekzistas. En la dua duono de la jarcento Brugge havas 8 paroĥiajn eklezioj: La St.Savinto,de Nia Sinjorino,de St.Walburga,de St.Jakobo,de St.Egidio,de St.Katarina,de la beginoj kaj de St.Donaciano (la lastaj estas tre malgrandaj paroĥioj).Kiam oni pristudas la internan organizon de tiuj preĝejoj ekz. la fondigo de kapelianoj oni vidas ke estas epoko de prosporo por la Bruĝanoj.Ĝi estas la glora epoko de Brugge kiu konduktos al la plejalto en 1300.En tiu jaro la sekvantaj landoj kaj regnoj sendis varŝipojn al Brugge: Anglujo,Skotujo,Irlando,Norvegujo,Danujo,Svedujo,Ruslando,Hungarujo,Bohemio,Germanujo,Polujo,Bulgarujo, Navario,Aragono,Kastilio,Leon,Andalusio,Granada,Galicio,Portugalujo, Fez,Marokio,Tunisio,Mallorkio,Sardinio,Konstajtinopolio,Jerusalemo, Egipto,Armenio,Tartario,Francujo,Gaskonio,Sicilio.Certe estis ankoraŭ aliaj.+/- 1295 Brugge ekhavas la lastan ĉirkaŭmurigon kiu ĉi-foje tamen estis multe tro granda.Grandaj malkovraj terenoj restis interne de ĝi.Estas tiu fortikaĵo kiu nuntempe estas la belega promenadejo ĉirkaŭ granda parto de la urbo,kiu en la deksesa jarcento estis plena da muelilo de kiuj ankoraŭ nun estas du,proksime de la St.Krucpordego.Ekzistas ankoraŭ kvar pordegoj; 2 tre grandaj: la Genta kaj Krucpordegoj; 2 sufiĉe grandaj: la forĝista- kaj la azena pordegoj.Ankaŭ la ĉi-tiun fojon estis la franca reĝo kiu konstruigis ĝin.Li esperis ke li povus gardi la fortan remparon Brugge en siaj manoj sed tamen la Flandroj nec kaptis ĝin ka profitis.

Kiel aspektas la urbo ? Kiam oni parolas pri la belegaj luksegaj nezepokaj komercurboj,tiam necesas aldoni multe da imagpovo.La plej granda parto de la domoj estas ankoraŭ el ligno,tiel ke kiam domo ekbrulas estas ĉiam preskaŭ tuta kvartalo kiu forbrulas.Pro tio oni tiel ofte legas en antikvaj dokumentoj pri gravaj forbruladoj.Nur la ĉefaj stratoj estis per ŝtonoj kovritaj.Tre ofte la ŝtonoj estis metitaj nur de spaco al spaco por ke la homo ne devu tre marŝi en la koto kiam pluvegis.Tre multaj homoj havis dombestojn: porkojn, bovojn,ŝafojn kiuj je libera povis kuri sur la strato; ne jam ekzistis tramoj aŭ aŭtomobiloj! Malgraŭ ĉio Brugge estis siatempe tute moderna urbo.En la fino de la 13-a jarcento oni ekzekutis gravajn laborojn: banejojn kaj kloakojn.Kiom da enloĝantoj estis en Brugge? Longtempe oni parolis pri 200.000. Oni miskalkulis. Brugge kaj Gent havis inter 35.000 kaj 50.000, Ieper inter 25.000 kaj 35.000. Mi diris ke la glora epoko de Brugge etendiĝas ĝis 1300 kiu estas la apogeo.Tuj poste komenciĝas la tragedia epoko.Fakte ĝi jam komenciĝis en la dua duono de la 13-a jarcento kiam la Bruĝanoj havas malfacilaĵojn kun la Angloj kiuj liveras al Flandrujo la lanon kaj kiuj de en la manoj havis nian industrion.Pli gravaj aferoj okazos.Nun Brugge devas luktegi kontraŭ danĝeregaj malamikoj kaj pereas sub unu inter ili: 1280. La belfrido forbrulas.Ĝi entenis ĉiujn rajtigajn pergamenojn kaj dokumentojn de nia urbo.Tre grava bato ĝi estis.Ili volis rehavi la rajtojn skribitajn kaj la grafo volis profiti por doni iom malpli da rajtoj.Teruraj ribeladoj ekestis kontraŭ la grafo kiu tamen ĉion devas redoni.Pli danĝera malamiko survenas: La Francoj kun reĝo Filipo la Bela,ankaŭ nomita la Monfalsiganto.La Flandroj estas komplete subpremataj de la Francoj.

Ili okupas unu post la alia ĉiujn urbojn.Francemula partio helpas ilin.En Brugge estas ega luktado inter la du.En Gent la francemuloj regas la situacion.Generala ribeliĝado ekleviĝos.Brugge estis ĝia kapo.Unua radikala purigo okazas en Brugge mem dum majo 1302.Ĝi estas famkonata sub la nomo de: Bruĝaj frumatenaj herpreĝoj.Apenaŭ du monatoj poste Brugge,kun forta helpo de la urbo Ieper,de la libera bruĝa komunumaro kaj de la popolo de la marbordo kiujn helpis kelkaj aliaj grupoj,ekzemple el Gent,iras renkonten al la Francoj kaj apud Kortrijk okazis la fama batalo de la "Oraj spronoj".Je rememoro de tio la 11-an de Julio estas la nacia tago de la Flandroj.Ĝi estis ega malsukceso por la franca reĝo.Li nun estis pli singardema kaj povis jam rekomenci en 1304.Ne decida batalo,sed venis tamen la traktato Athis sur Orge kiu estis ege maljusta je la Flandroj.Fortaj punoj trafis la Bruĝanojn.

Sed venis alkoraŭ pli granda malamiko kontraŭ kiu ĉi-foje Brugge malgajnos kaj kiu mortigos nian urbon.Ĝi estas la sabloploniĝo de la Swin.Paralele kun la maro kiu retiriĝis ankaŭ la akvo el la Swin retiriĝis.Tio estis nehaltigebla: kiel la naturo kreis tre taŭgan lokon por ŝipveturi kaj elŝipiĝi, tiel ĝi detruis tiun lokon; kiel ĝi kreis la gloron kaj la potencon de Brugge,tiel ĝi detruis Brugge.

(daŭrigota - skribis: F.Roose)

C. 2916

[illegible] DE NIAJ [illegible] : - Pensoj por tiu-ĉi tempo.

Ĉiam oni devis laboregi por plibonigoj,aŭ,se pli radikale,por reformadoj. Laŭ ke tiuj movadoj estis ĝis pli fortegaj,des pli ili montris al pli profundaj kaŭzoj.Unu de la tezoj de la genia Angla Katolika verkisto Gilbert KEITH Chesterton,estas ke ĉiuj malfacilaĵoj venas pri y tiu-ĉi fakto ke oni ne konformigas la ordonojn,institutojn ktp. al la naturo de la homo; ke oni ĉiu denove kaj denove deflankiĝas de la naturo.Tre sprite kaj eksterordinare komike,li defendas tiun vidpunkton i.a. en la libro "Wat mankeert de wereld?" uitgave "De Toorts",Hamstede en "Wiek op" Brugge.

Generale kaj nepre taŭga principo kiun oni devas sekvi je ĉiuj reformadoj estas tiu-ĉi: ĉiu aranĝo devas esti farata en konformo je la "naturo" de la homo.Tuj kiam oni kreas ion kontraŭnaturan ĝi estas al morto kondamnita. Ĝi detruas sin mem; ĉar venante el la homo kaj direktante sin kontraŭ la naturo de la homo,ĝi kapablas nur fali antaŭ la postuloj de tiu naturo aŭ detrui tiun naturon mem.Sed jen venas la unua granda problemo.Ĉu la naturo de la homo estas esence bona? aŭ malbona? aŭ malbona kaj bona samtempe?

Jean Jacques Rousseau (1712-1778) asertas ke la naturo de la homo estas bona.Estas la societo kiu malbonigas la homon.La plej multaj protestantaj sektoj asertas ke la naturo de la homo estas malbona kaj nur malbona.La Rom. Katolika Eklezio defendas la tezon ke la homa naturo "falis" pro la peko de niaj unuaj gepatroj.Efektive,ni povas konstati ke la homa naturo estas samtempe kaj bona kaj malbona.La malbono kaj la bono samtempe tentas nin jam de nia plej frua infanaĝo; kaj tio daŭras dum la tuta vivo. Inter du polusoj ni estas distirataj.Unu poluso tiras nin supren.La alia tiras nin malsupren. Jam en la plej frua infanaĝo ni vidas en la infano du malvirtojn: la malkuraĝeco kaj la egoismo.(tiu-ĉi lasta estas fakte komponento de multaj malvirtoj).En tre multaj okazoj kaj kontraŭ ĉiu evidenteco,la infano volas superi ĉiujn aliajn.Ankoraŭ pli juna,ĝi estas,instinkte,submetita,kiel la bestoj,al la leĝo de la egoismo.Kaj tamen sammomente ĝi faras ofte montron de sindonemo kaj oferemo.Ĉu ankaŭ instinkte ĉu pro manko de kompreno aŭ de sento kaj de valortakso pri la morala idealo de la objektiva bono? Ĉiuokaze la fakto ekzistas kaj ĝi pruvas tezon ke du kontraŭaj fortoj manifestiĝas en nia naturo.

Ĉu tiu-ĉi konsideroj estas gravaj por projektoj pri reformado [illegible] kaj [illegible] freskaŭ ĉio dependas de ili.Se ekzemple la homa naturo estas esence nur malbona,oni venos al la negacio de la libera volo (aŭ volpovo,volkapableco) Efektive,oni je teorie povas ankoraŭ defendi la la tezon ke la homo inspirita de la racio kaj armita per la libera volpovo,faros nur bonajn agojn kontraŭ la tendenco de sia malbona naturo.Sed praktike tio ne estas ebla.Se per sia racio la homo konfesas la valoron de la idealo tiam ĝi certe sentos ofte profunden emon al tiu idealo; kaj tiu emo ofte inspiras ĝiajn agojn.Kaj se tamen kaj malgraŭ ĉio,la naturo restas esence malbona,oni ne kapablas kredi ke la homo per siaj solaj racio kaj volpovo (=kiu cetere estas ankoraŭ ofte malforta) faros nur bonajn agojn.Kontraŭe; ni estas praktike certaj ke preskaŭ nur malbonajn agojn ĝi faros.El tio sekvas tre grava konkludo.Nome ke ĉiuj institutoj en kiuj la homoj vivas,ke ĉiuj sistemoj laŭ kiuj la homoj vivo nun estas arangitaj,ke la ŝtato mem devas esti nur sistemoj de hom-dresado.Ke parabele kun la bestdresado,ni nun bezonas homdresadon.Nur la dresado per puno kaj timo kaj per forpreno de ĉiu libereco kapablos honeste,ni diras honeste, ordigi la homan kunvivadon.Estas en tiu kazo necesa la komunismo; ne la positiva komunismo (=ĉio apartenas al ĉiu) sed la negativa komunismo (= nenio apartenas al iu ajn).

Vi ĉiuj,gelegantoj,tuj sentas ke tia sistemo estus netolerebla por la homo.Tia sistemo estas kontraŭnatura.Se,kontraŭe,la homa naturo estas esence bona kaj nur bona,tiam oni venas logike al la plej kompleta liberalismo,sen [illegible]giteco senmezura.Ni ne plu bezonas teoriojn por refuti tion.La historio devis la pruvojn.Fortuloj misuzis,elsuĉis malfortulojn.

Ni scias ke la homa naturo estas esence dunatura: bona kaj samtempe malbona; kiel ni diris en la komenco de la artiklo.

Krom per la racio kaj la libera volkapableco,kiujn posedas la homo,ni bezonas al la perfektiĝ- kaj perfektiĝebleco de la homoj.Tio kion ni bezonas estas: reformadoj tute konformaj al la homa naturo.

Estas plej laŭ tiu sistemo ke plej da homojn sentos sin en feliĉega stato. Tiamaniere estos plej da okazoj en kiuj la bonaj instinktoj en la homoj laboras.Inter homoj kies naturaj postuloj (=postuloj de ilia naturo) estas kontentigitaj,ne okazas tiom da krimoj (pro posedo ktp.) kiom inter homoj kiuj vivas en homamalindaj situacioj.Estas tamen ankoraŭ multe da malbonaj faroj.

OKAZE DE LA NOVA JARO !

(senpaga aldonaĵo, al nia informbulteno "Mededeelingen", kun la deziregoj al la geklubanaro efektivigotaj dum la jaro 1943)

= = = = = =

Krom la deziroj al ĉiuj, kiujn nia estraro jam faris, ni havas specialajn dezirojn por kelkaj inter vi kiuj ja havas sekretajn esperojn, malfacilaĵojn ktp.

Kaj do ni deziras al :

Roger ISERENTANT : ke ĉiuj, absolute ĉiuj venu kiel eble plej akurate je fiksita horo al la kunveno, eĉ.....li mem.....kelkfoje (?)
Plie....jaro kun multe da glaciaĵo.

Roger MARTENS : venki la prezidanton en la ping-pongludo, kaj ...daŭrigo de la evoluo kiun li nun faras.

Grégoire MAERTENS : ke ĉiu Bruĝano (de la granda Bruĝo) kaj ĉiuj infanoj de tiuj Bruĝanoj aĉetu almenaŭ unu Esperanto-krajonon.

Denise MALY : dekoble tion en la grupkaso kion estas nun en ĝi.

Etienne DE BAETS : (direktoro de SoSoSo) : diplomo de la GeStaPo, kaj... ke morgaŭ plibonfartos.

Telesphore VANDER PLANCKE : edzino.....sen fino !

Alfons MORRO : verki la eposon de la grupo kaj iĝi la plej bona psikologo de la virinoj.

Fernand ROOSE : ke la homaro per logika rezonado venu al la plej ideala moralo.

Marie-Louise ROOSE : iri sur la vojo de Schubert, W. Rummel k.a.

Marie-Thérèse ROOSE : ankoraŭ pli zorgema persekuto de la SoSoSo pri ŝiaj vivo kaj rilatoj (estas necese !)

Raymonda SCHOUTEET : biografia artikolo en la revuo.

Jacqueline CALLEWAERT : hejme paroli nur en Esperanto kun frato Carlos

Marguerite CUQUET : iĝi la dua pianistino en la grupo.

Henriette DE KERSGIETER : parolado en la grupo pri ŝia profesio kaj ĝenerala higieno (kun lumbildoj !)

Baudewijn VERLEYE : la baldaŭa efektiviĝo de la plano : 10 horoj da laboro ĉiutage.

Julien DE ZEINE : trovi en nia grupo la atmosferon kaj la veran kamaradecon kiujn li deziregas; trovi ankaŭ ĉe ni, en nia malgranda mondo, la efektivecon de la ideala homaro kiel li ĝin revas kaj al kiu li sopiregas.

Marie-Louise STENAVE : legi ĉiujn T°-librojn kiujn ŝi havas de nia grupa biblioteko.

Al multaj : reveno al nia grupo !

Al la studentoj : agrabla studo en niaj kursoj !

Al Belga Ligo Esperantista : Requiescat in Pace !

Kaj fine ni deziras al la tuta mondo : "Paco kaj Justeco"

Ni havas ankoraŭ dezirojn......sed ni ne povas esti tro maldiskretaj.

"P. k. J."

& & & & & & & & & &
& & & & & & & & &
& & & & & & & &

## ER WAREN TWEE ESPERANTISTJES....

Aan M.T. mel.:"Van 2 Koninckskinderen"

I. Er waren twee Esperantistjes,
Ze hadden elkander zoo lief,
Ze konden bijeen veel komen,
'des middags in de Steenstraat alhier.
Zij hadden elkander gezworen
dat het slechts vriendschap zou zijn
Een ander lot werd hen beschoren
dit van liefde en minnepijn.

II. Zij was er een leuk blondinneke
Een kuiltje had z'in iedere wang
Een poez'lig dubbel kinneke
en 't tongetje een beetje lang.
Voor spelen en dart'len nooit moe,
een vroolijk en zonnig ding.
Toch hield zij 't hartje steeds toe
wanneer 't om echte liefde ging.

III. Hij was er een jong studentje
Had twee jaartjes nog te doen,
een aardig schrander ventje
belust op een frisschen zoen.
Zijn haar en zijn wilde gebaren
getuigden van onstuimigheid
Hij kende niet de gevaren
der minne's "Lovesleid"

IV. Als zij elkander ontmoeten
in de groep of soms ook op straat
dan sloeg reeds bij 't eerste groeten
hun beider hartjes op maat.
En gauw werd de liefde geboren,
een spelletje vol zonneschijn.
Hij had er zijn hartje verloren
en zij was er haar glimlach kwijt.

V. Dit duurde nu enkele maanden
tot lente weer kwam in het land
en zij die 't een paartje reeds waanden
bemerkten.....het lek in de band.
Zij was er het spelletje reeds moê
en zond hem wandelen....fijn!
Ze sloot weer haar hartje toe
Hij bleef......en voelde pijn.

VI. Ach wil mij nog aanhooren
Tot slot dees kleine moraal:
Werd zelfder lot U beschoren
beluister dan dees wijze taal:
"De liefde is de vrouw aangeboren,
Ze ziet in het leven slechts spel.
En is haar de schoonheid verloren,
dan is de man niet van tel".

( A. NORRO)

## HET ESPERANTOBOOTJE

mel.: "De zevende hemel"
aan Henriette en Nand.

I.

Weet je wat er nu gebeurde
Wat de leden bracht veel vreugde
Dat Nand Roose zich koos eene vrouw
Lang moest het toch wel duren
eer dit feit kon gebeuren
Doch eindelijk vond hij; beloofde trouw

Refrein: En samen waren ze weldra door
zee in het Esperantobootje.
Gezelliger is het toch met z'n twee
in het Esperantobootje.
Liefde verbind hen met duurzamen band
Maar Esperanto blijft steeds 't verre
( strand
En komen er meer... ze varen al mee
met het Esperantobootje.

II.

Als professor die haar leerde
was't dat zij hem dra begeerde
Toch was't steeds diskussie en erg ka-
Als ze ooit nog ruzie maken (baal
weet Nand vlug de twist te staken
Hij spreekt dan de Esperantotaal.

III.

In de vreugde van hun minnen
Konden zij hun hart bedwingen
Verdoken bleef 't spel voor de gansche
Tot de Sososo zich roerde (groep
en hun duistre gang afloerde:
Toen deden zij op ons zwijgen beroep

IV.

't Is voorwaar een prachtig paartje
Niet zoo maar voor één jaartje
maar voor 't gansche leven zijn zij
(nu te saam.
Komt een kleintje hen verblijden
Geen mensch is die 't kan vermijden:
Het krijgt vast een Esperantonaam!

( A. NORRO )

8888888888

---

kaj de malfacilaĵoj.Certe,neniam oni tute forigos ilin.Sed lau tiu-ĉi maniero oni igos ilin al sia minimumo.Oni memoru ankaŭ ke,se tamen per iu kruela,perforta,kontraŭnatura sistemo oni volus tute forigi ilin,oni memoru ke la homo estos ĉiam sufiĉe inteligenta por elgliti el la reto.Oni eltrovu kiu aj sistemon de devigado,de kontrolado ktp. - ĉiam la homo fine trovas rimedo kontraŭ tia sistemo kaj ĉiam tia sistemo laboros nur malfacile pro la kontraŭagado de la homoj.Nur unu rimedo tiam helpos: igi la homojn pli moralaj.Tiaj tiuj homoj,obeante al interna voĉo,mem decidos submeti sin al reguloj,aranĝoj,kaj en tio kuŝas la unu nura,vera,reala,sola progreso.

(R.A.N.D.I.)

8+8+8+8+8+8+8+8+8+8+8

POPOLUMUECO : -

Vi scias kion la Romanoj diris: "Sana menso en sana korpo".Vere,menso nur kapablas estiĝi sana se ĝi estas en sana korpo.Bona supernaturo ne estas ebla se ĝi estas bazita sur malbona naturo.La naturo ekzistas.Do,la naturo havas siajn leĝojn.La naturo estas kreitaĵo de Dio.Se do vi vundas la naturon,se v kontraŭagadas ŝiajn leĝojn,vi pekas.Tio venĝiĝos.La naturo malboniĝas.La supernaturo ne plu havas forton bazon.La supernaturo ankaŭ vundiĝos,intelekte kaj morale.Vere tre esceptaj estas la homoj kiuj atingas sanktecon per kripligo sub iaj ajn formo de sia naturo.Tio estas vera por la individuo kaj por la popolo.Disŝiro de popolo estas vundigo de tiu popolo en ĝia naturo.Baldaŭ vi vidos la sekvojn en ĝia supernaturo intelekta kaj morala.

Por intelekte kaj morale altteni iun popolon,ne vundigu,sed plejeble perfektigu ĝian naturon.Sole tio ne sufiĉas; sed ĝi estas tamen absolute necesa kondiĉo.Ĉio tio estas facile komprenebla.

Se vi volas ke iu popolo interesiĝu al relegia vivo,al pli supernatura vivo,tiam ĝi devas interesiĝi al ĉio intelekta,do ankaŭ al sia literaturo,si arto,Tio estas la antaŭlaboro.

Popolo devas esti kiel eble plej multe fortirata de la materialismo.Tia ĝi iĝas komprenema kaj akceptema por la supernaturo.Kaj tion oni devas fari kiel eble plej bone.Ni devas havi la plej eble bonajn literaturajn kaj artajn kreitaĵojn kaj esprimojn de la homa spirito.Tio nur estas ebla se ĉiuj parto de iu popolo en plena harmonio kunvivas kaj kunlaboras.

Konkludo : Pro du motivoj oni ne rajtas disŝiri popolon : I) ĉar estas peko kontraŭ la naturleĝo 2) ĉar oni endanĝerigas la supernaturon.

(F.R.)

%%%%%%%%

AUTORITATECO :

Kiel ĉiu aŭtoritato estas limigita,tiel ankaŭ ĉiu aŭtoritatulo estas limigita en sia aŭtoritateco.Profesoro de historio estas kompetentulo,sekve aŭtoritatulo pri historio kaj ne pri literaturo nek pri piedpilkludado nek pri iu ajn alia fako.Tiu profesoro,en la universitato,edukos studentojn al historiistoj kiuj do ankaŭ iĝos aŭtoritatuloj pri la historio,sed ne pri alia fako ol la historio.Kelkfoje okazas ke intelektulo estas doktoro pri filozofio kaj ankaŭ pri naturscienco.Tiam li estas aŭtoritatulo pri tiuj du fakoj kaj ne pri aliaj.Tre ofte okazas ke oni ĝisfunde studis unu branĉon kaj duone alian Tiam oni estas kompetentulo pri tiu unua branĉo kaj duonaŭtoritatulo pri la dua kaj nenio pri la aliaj.

La samon ni devas diri pri la eklezia aŭtoritatuloj.Kristo mem edukis la aŭtoritatulojn unuajn pri kredo kaj moralo,do pri teologio kaj filozofio,kiu siavice edukis aliajn aŭtoritatulojn.Tio sinsekve okazis ĝis nun.La nuntempaj episkopoj kaj aliaj estas aŭtoritatulojpri kredo kaj moralo,kaj ne pri aliaj aferoj.Certe okazas ke ankaŭ iu episkopo speciale studis politikan sciencon,tiam li estas aŭtoritatulo ankaŭ pri politiko,sed ne kiel episkopo, sed jes kiel politikisto.

Konkludo : Ĉiu aŭtoritatulo estas limigita,ankaŭ eklezia aŭtoritatulo.Li estas tenata en la fako pri kiu li estas speciale instruita,kiun li speciale pristudis.

Nur Dio estas la absoluta aŭtoritatulo.

(F.R.)

VWVWVWVWVWVWVWVWVWVW

- La vivo de virino inter I5 kaj 25 jaroj estas: lukto de koro kontraŭ mens inter 25 kaj 45 jaroj lukto de naturo kontraŭ la arto de la tualeto; de post 55 jaroj: firmega protekto de fortikaĵo kontraŭ la atakoj de la tempo.

(Bernard Shaw)

ANGULO DE LA SERIOZA LABORO: - A/ Studadanguleto : Ĉu A, ĉu E ?

1) Ĉu vi estas bicikle ?
2) Ĉu vi venos sola ?
3) estas bela
4) estas varme
5) li juĝis ne oportuna diri tion publike
6) Mi estas malfrue, ĉu ne ?

Wanneer men bovenstaande voorbeelden leest, die men in gesprekken nogal veelvuldig tegenkomt, zou men waarachtig niet meer weten wanneer men een A of een E aan de bijvoeglijke naamwoordstammen moet voegen. Nochtans wordt het eenvoudig als men een beetje nadenkt. Het komt er allemaal op aan te zien of dat woord in betrekking staat met een zelfstandig naamwoord (en in dat geval moet het eindigen op A, vermits het dan een bijvoeglijk naamwoord is) ofwel met een werkwoord (en in dat geval is heet een bijwoord en moet het dus eindigen op E). Nemen we de eerste zin. Bicikl' kan onmogelijk een kwalificatie zijn van vi, dus bepaalt het het werkwoord esti. Evenwel weten wij nu dat na het werkwoord esti een bijvoeglijk naamwoord (uitgang A) volgt omdat esti steeds een identificatie, een vereenzelviging aanduidt tusschen een zelfstandigheid en een hoedanigheid van die zelfstandigheid. In dat geval kan er maar één oplossing meer zijn: esti staat er voor een ander werkwoord. En inderdaad, de zin "Ĉu vi estas bicikle ?, staat er eigenlijk voor: "Ĉu vi venis bicikle?". En in deze zin is bicikl' alleszins een bepaling van de manier waarop ge gekomen zijt; dus is het een bijwoord met E.

De tweede zin: "Ĉu vi venos sola?" "Ĉu vi venos sole" heeft ook een beteekenis, maar een andere. Vermits sole bepaalt het dan het werkwoord veni en is de zin identiek met: "Ĉu sole vi venos?" (Zult gij alleen maar komen?) (en niets anders dan dat.) Sola: vermits een bijvoeglijk naamwoord (het eindigt met A) bepaalt de zelfstandigheid vi. En dus beteekent die zin: "Komt gij alleen?" (en niemand anders?).

De derde zin: "Estas bela" is alleen te verrechtvaardigen als een zelfstandig naamwoord, dat in het gesprek gekend is, onderverstaan is.

"Estas varme" beteekent: Het is warm. Want "het is" wordt evenveel vertaald door "estas" als door "ĝi estas". Neemt ge de volledige vertaling "ĝi estas ..." dan is het varma, want dan is varm' een bepaling van ĝi.

"Li juĝis ne oportuna diri tion publike". We stellen nogmaals de vraag: wordt bepaald door oportuna? Wilt gij zeggen dat hij ongelegen oordeelt? Zoo ja, dan: "Li juĝis ne oportuna" Wilt gij zeggen dat hij oordeelde dat het ongelegen was dit in 't publiek te zeggen? Zoo ja, dan: "Li juĝis ke ĝi estis oportuna diri tion publike". En zoo ziet ge dat oportuna een bepaling is van ĝi; en ziet ge ook dat "ke ĝi estis" omwille van de verkorting er uit gelaten is. Publike eindigt natuurlijk op E vermits het een bepaling is van diri.

En eindelijk de laatste zin stelt ons voor het zelfde geval als de eerste zin waar estas er staat in de plaats van een ander werkwoord, nml. venas. Malfrue natuurlijk met E vermits het veni bepaalt. "Mi estas malfrua" met malfra als bepaling van mi, heeft natuurlijk geen zin.

Is het duidelijk ? Mogen wij hopen dat ge nu wat meer vertrouwd zijt met sommige rariteiten (op het eerste zicht) van Esperanto.

(verzorgd door Drs. Fernand Roose)

B/ anguleto de la serĉemuloj

Kun la tre malfacila silabenigmo, sed kun specialaj premioj, ni rekomencis la ĉiumonatajn konkursojn en nia revueto, de la pasinta monato. En la hodiaŭa numero ni daŭrigas per multe pli facila tasko, nome du "magiaj kvadratoj". La sekretario - prizorganto de tiu rubriko - atendas la respondojn antaŭ la 15-a de Februaro. Oni donu la solvojn al li en la grupo aŭ ilin sendos rekte al la sekretariejo: Pottenmakersstraat nr 20 - Brugge.

&&&&&&&&

Formu horizontale kaj vertikale la samajn vortojn (la krucoj anstataŭas literojn kaj la signo (R) signifas: R dikvorton)

| I | 2 | 3 | 4 | | I | 2 | 3 | 4 | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| X | X | X | X | I. Monstra fiŝo (R) | X | X | X | X | I. Birdo |
| X | X | X | X | 2. Altrangulo (R) | X | X | X | X | 2. Birdo (R) |
| X | X | X | X | 3. Dolorigi per pintaĵo. | X | X | X | X | 3. Substanco por bak. (R |
| X | X | X | X | 4. Floro (R) | X | X | X | X | 4. Speco de bongusta |

GRUPA VIVADO :

Al ĉiuj genembroj de "Paco kaj Justeco" kaj al ĉiuj gelegantoj de ĝia informbulteno, nia estraro deziras feliĉegan kristnaskon kaj multe pli feliĉan Novjaron ol la jaro kiu pasis.

Ni devas bedaŭrinde konstati ke la spirito de Kristnasko malpli ol iam regas sur la mondo. Kaj vi vidas ke ju pli la mondo foriras de ĝi, des pli ĝi venas en mizera stato.

Tamen en vi mem, interne, vi kapablas, se vi volas, lumigi tiun spiriton. Vi kapablas, se vi volas, lumigi tiun spiriton en via malgranda familia aŭ amika mondo. Tiu spirito devas regi en nia grupo. Ĝi tiam alportos al ni feliĉegon tre delikatan, tre altan, tre puran, tre intiman.

La feliĉegon kiun sentas homoj kiuj volas nur bonon al siaj proksimuloj, kiuj vere amas siajn proksimulojn, kiuj ĉiumomente estas pretaj helpi tiajn proksimulojn. Tiu spirito estas samtempe en kompleta harmonio kun la "Interna Ideo" de Esperanto. Kaj vi, niaj kunlaborantoj, restu fortaj kaj fidelaj en la konvinko ke nur tiu ideo kaj tiu spirito povas alporti solvon al la problemoj de la malfeliĉa, luktanta homaro.

(La estraro de "Paco kaj Justeco")

\+ + + + + + + + + +

ATENTU: la adreso de nia sekretario kaj sekretariejo denove ŝanĝis. Ekde la 12-a de Decembro oni sendu ĉiujn korespondaĵojn al jena adreso:
ISERENTANT Roger - Pottenmakersstraat n° 20 - Brugge.

\+ + + + + + + + + +

AL LA GEANARO: - Kiel pasintvintro nia klubo reorganizas la dimanĉajn kunvenojn en nia ejo. La geamatoroj de ŝakludo - biljardludo - ping-pongludo ktp. do regule kunvenu la dimanĉmatenoj por agrable pasigi la tedajn vintrahorojn.

\+ + + + + + + + + +

La ĵaŭdvesperaj kunvenoj: - Senescepte ni ankoraŭ ĉiu semajno kunvenas ĉiun la ĵaŭdo vespere je la oka. Nian kunvenon la genembraro sufiĉe regule kaj grandnombre vizitas kaj ĉiuj interesas al la diversaj programpunktoj. La geanaro nuntempe serioze laboregas al la Esperanto tradukado de la verketo de E. Zimmermans "Juffrouw Symforosa, begijntje". La jam tradukitaj paĝoj regule aperas en nia informbulteno "Mededeelingen". Ekde kelkaj semajnoj ni ankaŭ komencis tradukadon kaj studadon de la Esperanto verketo de Dr. Edmond Privat: "Esprimo de sento en Esperanto". La kono de tiu verketo multe pli familiarigos la geanaro kun la malfacilaĵoj (se ili ekzistas) de la Esperanto lingvo.

\+ + + + + + + + + +

ZAMENHOFA VESPERO: - Por rememori la 15-a de Decembro (Zamenhoftago) nia grupo organizis tutspecialan klubvesperon kun ekspozicio de libroj - poŝtkartoj ilustritaj - poŝtmarkoj - flugfolioj - presaĵoj ktp. akiritaj pere de la korespondado en- kaj eksterlande. Krom kelkaj estraranoj paroladis pri temoj koncernante la ekspozicio kaj la signifo de la rememortago. Ni reparolos pri tiu afero en venonta numero pli detale.

888888888888888 888888888

LITERATURA ANGULO : a/ poezio :

Unu membro de nia grupo petis por aperigo de la ĉi-suba belega poemeto. Fidela al nia devizo "plenumi kiel eble plej baldaŭ kaj plej perfekte la dezirojn kaj petojn de niaj genembroj" (bedaŭrinde ke nur malofte fojo envenas peton aŭ deziron) ni do tuj donas la demanditan versaĵon.

HOMA INDECO

Al mi skribis el Manilo
Iu : Vivu la Rusland'.
Vivu kristan religio,
Vivu blanka rasa grand'

Ho amiko, bonan koron,
Noblajn sentojn havas vi
Bedaŭrinde vi forgesis,
Kio estas religi'.

Vi forgesis ke laŭ Kristo
Homo estas Diimag'
Ne per sia blanka haŭto,
Sed per krea vort' kaj ag'

Vi forgesis, ke ŝatinda
Por Di' estas nur anim'
Ke blankigas ĝin nur virto
Ke nigrigas ĝin nur krim'...

(Prof. Prel. A. Dombrovski )
1860 - 1938

&&&&&&&&&&&& &&&&&&&&&

B/ prozo: - (daŭrigo de la tradukado de la verko de la flandra aŭtoro F. Timmermans "Juffrouw Symforosa, begijntje". La traduko prizorgas la geanaro de la bruĝa Esperanto-grupo "Paco kaj Justeco" en la ĉiusemajnaj kunvenoj)

......

A KRUCVOJO :

La beginejo silentas post la tagmezo. Latene la homoj kaj beginoj faris siajn aĉetojn, al la vendejo kaj ĉe la butikistoj.

Nur ĉio internestas kaj la ardenta suno brilas sur fermitaj pordoj. Kolko sidas sur la kupra koko de l'turo, kaj sur la palaj, puraj pavimeroj neta pasero.

La ĝardenetoj kiuj kuŝas antaŭ la dometoj estas plenaj de floroj kaj ki... la ... suno radias sur ĝi oni sentas ... en la okuloj.

... tie sambukoj, violoj, grizaj pizoj, peonioj, heliantoj, de fortaj kaj ... koloroj.

Simforosa opinias tiun-ĉi horon bela por fari la krucvojo. La krucvojo ... pentraĵetoj kiuj ĉiuj ... sub ardeztegmenteto estas najlitaj tie kaj ... al muroj de l'domoj aŭ al tiuj de l'preĝejo

Ili estas antikvaj, ŝvelmol ... kaj malspritE pentrit..., pro l'tempuzo kre... ŝvelit... kaj ... disskrapiĝintaj.

La unua stacio troviĝas sur la placeto de l'"Kalvario" kie en hederĝar... beto de violoj kaj mirtujetoj sub bluaj ligna ŝirmileto sid... ... Dimitri... kun la mort... Jezuo sur siaj genuoj.

Tiu unua stacio prezentas la kondamnon. Pilato kaj Jezuo kadukiĝis ĝis ... kaj figuroj pro la anguleto da suno kiu malofte brilas sur ili. Sed en alia angulo oni ankoraŭ bone vidas, tra la pordo de l'palaco, la trekton ... eston kondukanta al fontaneto.

Kiam Simforosa tie finis preĝi ŝi salutas la blankan sufergrupon kaj en... iras la S-ta Margaretostraton.

Kontraŭ la muro de l'preĝejo en denskredit... dometo sidas dika Dimitrio ... portas purpuran, jam verdiĝantan mantelon kaj fera ... no Lin ... kun igitaj manoj. Tiu Jezuo havas grizbrunaj lipoj kaj ... okuloj ... malkontente flankrigardas. Tiu statuo ĉiam kaŭzas timigan impreson sur Simforosa, precipe dum vespero kiam la granda lanterno lumigas antaŭ ĝi.

Kaj kiam ŝi finpreĝis rozarion pro timo ŝi iras al la dua stacio al la ... flanko de l(preĝejo.

8+8+8+8+8+8+8+8+8+8+8+8

KIEL ONI GIN ESPRIMAS EN ESPERANTO ?

Pli kara estas kapo ol ĉapo - (Het hemd is nader dan de rok)
Kapo majesta, sed cerbo modesta - (Groote lantaarn maar klein licht)
Kiom da kapoj, tiom da opinioj - (Zooveel hoofden, zooveel zinnen)
Konservas eĉ karbo la strukturon de l'arbo - (Men kan zijn afkomst niet verloochenen)
Karesi al iu la barbon - (Iemand honing om den mond smeren)
Kiam kato promenas, la musoj festenas - (Als de kat weg is, dansen de muizen)
Ĉiu klopodu nur en sia metio - (Schoenmaker blijf bij je leest)
Konscienco trankvila estas bona dormilo - (n'n goed geweten is een zacht oorkussen)
Kio konvenas al sciuro ne konvenas al vulturo - (Als 2 hetzelfde doen dan is het nog niet hetzelfde)
Kiu ludas kun koto malpuriĝas la manojn - (Wie met pek omgaat wordt er mee besmeurd)
En ĉiu kranio regas aparta opinio - (Zooveel hoofden, zooveel zinnen)
Granda kranio sed interna nenio - (Groote lantaarn maar klein licht)
El malplena telero vane ĉerpas kulero - (Waar niets is heeft zelfs de keizer zijn recht verloren)
El fremda ledo oni tranĉas larĝe - (Uit andermans leder is het goed riemen snijden).

X X X X X X X X X      X X X X X X X X X X X